

Esperanto en Danio

18-a jarkolekto • n-ro 3 • junio 2011



Partoprenantoj de la DEA-jarkunveno 2011

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Therkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 50 38 41 77 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.09.2011

Enhavo

Lastaj informoj.....3

Protokolo4

Kopenhago.....10

Bicikle kaj lingve organiziĝi. .11

Næstved.....16

Paperaj gazeteltondaĵoj.....17

Vikingoj cerbumas.....17

La Granda Preĝotago.....18

La dana patrino tago.....19

Signolingvo de surduloj.....21

Mi volus danki vin.....23

Tutpollanda Esperanto-

Kongreso.....24

Himalaja renkontiĝo.....25

Invito.....27

Lastaj informoj

pri la gravaj someraj aranĝoj: 96-a Universala Kongreso de Esperanto kaj 44-a konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Rapide alproksimiĝas la eventoj kiuj okupas la laborfortojn de ambaŭ LKK, kaj de nia anaro. Ni elkore dankas ĉiujn niajn membrojn, kiuj oferis sin kaj pretas helpi dum tiuj semajnoj, kaj bonvenigas pliajn helpantojn.



Tiuj du aranĝoj donos al nia movado la okazon esti pli videbla diversmaniere al la publiko. Dum la ILEI-konferenco estos lingva festivalo jaŭde la 21-an de julio de la 14.30 ĝis la

17.30, kie estos prezentataj 20 lingvoj. La lingvojn prezentos denaskaj parolantoj el pli ol 10 eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj + Esperanto. Ili koncize kaj ilustre prezentos siajn lingvojn kaj kulturojn kaj lernigos al la publiko kelkajn bazajn vortojn kaj frazojn. La adreso de la aranĝo estas Njalsgade 106.

La konferencon partoprenos s-ino Jianchao Yo, membro de la Esperanta redakcio de Ĉina Radio, kaj ŝi prelegos pri instruado de Esperanto en la Universitato pri Komunikado en Pekino. Tre interese estas ke tiu Universitato volas havi kontakton kun nia gastiganta Universitato de Kopenhago, kaj ili planas sendi delegacion la 20-an de junio.

Novajoj pri la UK: eniris la honoran komitaton du pliaj membroj: la lingva redaktoro de la Dana Radio, Martin Kristiansen, kiu esprimis grandan intereson por nia laboro, kaj profesoro Karsten Fledelius de la Fakultato pri Komunikado de la Kopenhaga Universitato.

Ni ricevis permeson de la Komunumo de Kopenhago pendigi rubandojn super la piedira strato "Strøget" ekde la 20-a ĝis la 26-a de julio .

Mirejo Grosjean proponis aranĝi surstratan farandolon (gaja procesio, dancada irado) kie ĉiu partoprenanto surhavas "haĉimaki"-tukon surfrunte, en kiu ĉiu partoprenanto skribos la nomon de sia denaska lingvo.

Estas japana tradicio kaj la surhavo de la rubando signifas por japanoj: mi atingos mian celon kun certeco. La celo de tiu evento estas konigi Esperanton al la danoj en Kopenhago. Tiu evento okazos dimanĉe posttagmeze. La itinero estas: foriro de la kongresejo je la 17a horo pere de la metroo al Kongens Nytorv kaj de tie tra la piedira strato al Tivoli. Oni devas mem kunporti blankan tukon 90x33 cm.

LKK deziras al ĉiuj partoprenantoj agrablan kaj fruktodonan kongreson!

Protokolo

de la Ĝenerala kunveno de DEA, la 10-an de aprilo .2011

Ĉeestantoj: 17 membroj, 6 estraranoj (Ileana Schröder, Arne Casper, Bent Jensenius, Finn Østerbæk, Jens S. Larsen, Ole Therkelsen)

Gvidanto: Lars Kromann

Protokolanto: Tara Gregers



La estraro kaj la kunvengvidanto surpodie

1. Elekto de kunvena gvidanto

Lars Kromann estis elektita kiel gvidanto. Li konstatis ke la ĝenerala kunveno estas laŭstatute kunvokita kaj ke la tagordo estas laŭ la statuto de DEA.

Li informis nin ke ĉi tiu estas la lasta fojo kun li kiel gvidanto.

2. Elekto de protokolanto

Tara Gregers estis elektita kiel protokolanto.

3. Jara raporto

La prezidantino Ileana Schrøder laŭtlegis la jaran raporton. La jara raporto estas legebla en “Esperanto en Danio” 2/2011. La raporto estis aklame aprobita.

Komentoj/Demandoj: Radojica Petrovic invitis ĉiujn al la ILEI konferenco en Kopenhago. Li disdonis aliĝilojn.

4. Jara kalkulaĵo

Ina Schulz komentis pri 'Egenkapital primo' ĉar la sumo estas tro alta ol 'Egenkapital ultimo' lastjare.

Ileana respondis ke la sumo estas pli alta ol lastjare ĉar lastjare oni decidis ke la Noll-Fonduso estu enmetita en ĉi-jaran kalkulaĵon.

Kim Henriksen demandis pri la luo por la Kulturdomo. Kial ĝi ne estas en la kalkulaĵo?

Ileana Schrøder klarigis ke Esperanto-Domo pagas la luon. Tara Gregers kaj Ina Schulz samopiniis ke ĉar Esperanto-Domo pagas la luon al la Kulturdomo direkte, la mono ne venas al DEA kaj pro tio estas malĝusta enmeti tiun en la DEA kalkulaĵo. Tio signifas ke se la ĝenerala kunveno aprobas la kalkulaĵon ĉi-jare sen ŝanĝoj, do, la kalkulaĵo estu aprobita kiel ĝi estas hodiaŭ.

La kalkulaĵo estis aprobita kiel ĝi estis prezentita – sen la pago de la luo de la Kulturdomo.

5. Laborplanoj de DEA 2011-2012

Ileana prezentis la planojn:

Informado: Partopreno en foiroj de Kopenhago kaj Ålborg, en la Komitato de la UN-Asocio kaj kontakto kun oficialaj instancoj kaj NRO-organizoj, organizado de prelegoj, sendado de gazetaraj komunikoj.

Instruado: Kunlaboro kun ILEI-sekcio por plifortigi la lingvan nivelon de nia membraro pere de kursoj kun eksterlandaj gastoj, apogo al perfektigo kaj ekzamenigo de junaj instruantoj pere de KER ekzameno.

Utiligado: Kulabori kun GEA kaj PEA en la organizado de Mezeŭropa Esperanto-kongreso venontjare en Berlino, subteni la utiligon de Esperanto fare de niaj lokaj kluboj, aranĝi Grundtvig-projekton kune kun niaj partneroj de Slovenio, Slovakio, Pollando kaj Kroatio.

Komentoj/Demandoj:

Kim Henriksen: Antaŭe pro la laboro por la UK2011 ni ne havis tempon por aranĝi pliajn aranĝojn. Ĉu estos tempo post la UK2011? Por diskuti tiuj en la membraro?

Ileana Schröder respondis ke oni sendu proponojn al la estraro kiu konsideros la proponojn. Ĉiuj povas mem kunveni por paroli pri aranĝoj.

Betty Chatterjee informis ke KEK decidis havi diskutkunvenon aŭtune.

Henning opiniis ke ne estas afero de KEK, sed de DEA, fari diskutkunvenon.

Ina opiniis ke sufiĉas sendi proponojn al la estraro.

La estraro promesis pritrakti tiun aferon.

La laborplanoj estis akceptitaj.

6. Proponoj

Nur unu propono: Amendo de la statutaj celoj (DEA Estraro)

Ileana Schröder laŭtlegis la proponon.

Ni konstatis ke la Kultura Ministerio kaj aliaj publikaj institucioj

traktas nin kiel interes-celan organizon kaj ne kiel soci-utilan organizon, kiu rajtas sendi petojn pri subvencio el publikaj financoj. La vortigo de la celparagrafo de nia statuto ne sufiĉe klare emfazas la idean aspekton de nia laboro, kaj tial ni proponas ĉi tiun amendon:

Nuna vortigo de la statutaj celoj:

2.1.

- *progresigi la komprenon pri la indeco de egalvaloro kaj egalrajteco en internacia komunikado*
- *labori por ke la transnacia lingvo Esperanto estu chiam pli vaste aplikata por komunikado inter homoj kun malsamaj gepatraj lingvoj.*

(Dane:

- *at fremme forståelsen for værdien af ligestilling og ligestilling i international kommunikation;*
- *at arbejde for at det transnationale sprog esperanto finder stadig større anvendelse for kommunikation mellem mennesker med forskellige modersmål.)*

Propono de amendo:

2.1.

- *Progresigi internacian interkompreniĝon cele al forigo de konfliktoj kaj de tuttera paca kunvivado.*
- *progresigi la komprenon pri kulturaj kaj lingvaj egalvaloro kaj egalrajteco kadre de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de UN.*

(Dane:

- *at fremme den internationale forståelse med henblik på fjernelse af konflikter og global fredelig sameksistens.*
- *at fremme forståelsen for ligestilling og ligestilling, både kulturelt og sprogligt, inden for rammerne af FN's Verdenserklæring om Menneskerettighederne.)*

Kim Henriksen proponis jenajn ŝanĝojn:

Ŝanĝo 1: Danlingve enmeti 'værdien af' en la propono de la DEA-

estraro, 2-a linio, tiel: - *at fremme forståelsen for værdien af ligeværd og ligeret, både kulturelt og sprogligt, inden for rammerne af FN's Verdenserklæring om Menneskerettighederne.*

Ŝanĝo 2: Danlingve konservi la 2-an linion en la malnova statuto kaj enmeti ĝin kiel 3-an linion: - *at arbejde for at det transnationale sprog esperanto finder stadig større anvendelse for kommunikation mellem mennesker med forskellige modersmål.*

La estraro akceptis la ŝanĝo 1 de Kim, sed ne la duan. Do, la propono de la DEA-estaro nun estis (danlingve):

2.1.

(Dane:

- *at fremme den internationale forståelse med henblik på fjernelse af konflikter og global fredelig sameksistens.*
- *at fremme forståelsen for værdien af ligeværd og ligeret, både kulturelt og sprogligt, inden for rammerne af FN's Verdenserklæring om Menneskerettighederne.)*

Ĉar estis ŝanĝo de la statuto, minimume 2/3 plimulto estis necesa.

Radojica Petrović kalkulis la voĉdonojn. Estis sekreta voĉdonado kaj pluraj havas voĉdon-rajtigilojn.

Unue la propono de Kim, ŝanĝo 2: Por 6 – ne sufiĉe da votoj, do la propono falis.

Due la propono de DEA (kun ŝanĝo 1 de Kim): Por 23 – sufiĉaj, do la propono estis aprobita.

7. Elekto de prezidanto (Ileana Schröder akceptas reelekton)

Ne estis aliaj proponoj.

Ileana Schröder estis aklame reelektita.

8. Elekto de 3 estraranoj (Jens S. Larsen, Finn Østerbæk, Regin Larsen akceptas reelekton)

Ne estis aliaj proponoj.

Jens S. Larsen, Finn Østerbæk kaj Regin Larsen estis aklande reelektitaj kiel estraranoj.

9. Elekto de 2 anstataŭantoj (Ejnar Hjorth, Stanislaw Mielczarek akceptas reelekton)

Ne estis aliaj proponoj.

Ejnar Hjorth kaj Stanislaw Mielczarek estis reelektitaj kiel anstataŭantoj.

10. Elekto de 2 revizoroj kaj anstataŭanto (Tara Gregers kaj Lars Kromann akceptas reelekton, Kamma Trandum akceptas reelekton)

Ne estis aliaj proponoj por revizoroj.

Tara Gregers kaj Lars Kromann estis aklande reelektitaj kiel revizoroj.

Kim Henriksen proponis sin mem kiel anstataŭanto.

Elekto:

Kamma Trandum, 18 por. Kim Henriksen, 5 por.

Kamma Trandum estis elektita kiel anstataŭanto.

11. Jara asembleo 2011

La venonta jarkunveno okazos en majo 2012 dum Pentekosto en Berlino kune kun la poloj kaj la germanoj.

12. Eventualaĵoj

Ilena Schröder informis pri la EEU-kunveno en Irlando

*Protokolo aprobita de la
protokolanto kaj la gvidanto*

Kopenhago

Prezidanto: Betty Chatterjee, chatterjeebetty@hotmail.com. La kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo okazas normale **ĉiun lundon** ekde la 19:00 horo en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 Kopenhago NV. Vespermanĝo eblas en la kulturdoma kafejo. Ni troveblas ankaŭ en Facebook ĉe “Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo”.

Programo ĝis oktobro

Junio

6-an: Karen kaj Finn parolos pri marioneta teatro.

13-an: Fermita pro la pentekosto.

20-an: Somera Ekskurso al Kristiano

Bonvenon ekskursi kun ni al Kristiano lundon la 20-an de junio. Ni renkontiĝu je la 17-a ĉe la metro-stacidomo de Christianshavn. Nia sperta ĉiĉeronino estos Di/Rut Jesus, kiu mem loĝas en la kvartalo de Kristiano.

Post la alveno al Kristiano ni unue manĝos vegetarane kaj post kiam Di montros al ni la kvartolon.

La sola vegetara restoracio funkcia lunde estas ”Grøntsagen”, kiu troviĝas fine de Pusher Street, apud Nemoland... bone estos, ke ni havos spertan ĉiĉeroninon. Tie oni povas manĝi bonan vegetaran manĝon kontraŭ 65 kronoj inter 17.30 – 19 horoj. Se ni estos pli ol 10 manĝontoj ni devos antaŭe informi la kuiriston. Do ni bezonas scii kiom da personoj volas partopreni la aranĝon.

Bonvolu aliĝi al la ekskurso antaŭ la 16-a de junio. Aliĝu retpoŝte chatterjeebetty@hotmail.com aŭ telefone 38 89 10 13.

29-an: Bonrevenon en la klubo. Ni rekomenciĝu per konversacio pri niaj travivaĵoj, impresoj ktp dum la Universala Kongreso.

Septembro

Sabate la 3-an kaj dimanĉe la 4-an estos *Internaciaj Tagoj* en Kopenhago. Ni havos standon komence de Nørrebrogade.

- 5-an: Lene kaj Jan Niemann prelegos pri Feroaj Insuloj, kiujn ili vizitis en majo 2010.
- 12-an: Konversacia Rondo. ‘Kien ni iru?’
- 19-an. Studgrupo. Marvirinstrato. ‘Meduzet’ p. 161-168.
- 26-an: Junulara vespero. Kio estas arto? Mathias Dalmose volus priparoli la temon, kaj proponas, ke ĉiuj kiuj volus, prezentu sian ideon pri tio. Oni montru ŝatatan artaĵon kaj klarigu, kial tio estas bona arto.
- 3-an de oktobro: Prelego. Amir prelegos pri la kulturo de sia naskiĝlando Bosnio.

Bicikle kaj lingve organiziĝi

*Prelego de Jens S. Larsen en Konversacia Esperantista Klubo,
Kopenhago, 2011-04-04*

Se oni povas diri ke la Esperanto-asocioj okupiĝas pri kultura politiko, tiam devas ankaŭ esti asocioj kiuj okupiĝas pri la trafika politiko. En Danio ekzistas du gravaj asocioj pri trafiko: FDM (*Forenede Danske Motorejere* – Unuigitaj Danaj Aŭtoposedantoj) kaj DCF (*Dansk Cyklist Forbund* – Dana Asocio de Biciklantoj). Same kiel DEA (Dana Esperanto-Asocio), ambaŭ estas proksimume centjaraj, kaj ambaŭ eldonis centjaran jubilean libron dum la lastaj jaroj. Se oni komparas la du jubileajn libron, oni facile vidas kiu asocio estas la pli riĉa.

Estas multaj interesaj paraleloj inter la historio de Esperanto kaj tiu de la biciklo. La nunspeca biciklo *kun ĉeno* estis produktita unuafoje en 1885 – kaj du jarojn poste, vi scias, aperis la unua libro pri Esperanto. Dum la jardeko antaŭ la biciklo furoris la velocipedo, kun la pedaloj sur granda antaŭa rado, kaj dum la jardeko antaŭ Esperanto furoris Volapuko. Do, kaj ĉe Esperanto kaj ĉe la biciklo oni dum proksimume unu jardeko havis antaŭtipon kiu ne tute bone funkciis – kaj sekve pli bonan tipon kiu neniam esence ŝanĝiĝis poste. Pensige, ĉu ne?

I

Ankaŭ en la historio de la *asocioj* por Esperanto kaj por biciklado estas multaj interesaj paraleloj; ekzemple ambaŭ ĉiam estis malriĉaj. Tamen estas ankaŭ gravaj diferencoj inter DCF kaj DEA. Ĉiuj scias kio estas biciklo, sed kio estas lingvo, tio jam estas multe pli abstrakta. DCF

defendas tre konkretajn interesojn de siaj membroj, DEA defendas ion multe pli idean. Ĉiuokaze estas tre interese kompari la evoluon de la du asocioj.

Jam en 1895 oni fondis en Kopenhago *Cykelstiforeningen*, la Asocion por Biciklaj Vojetoj. Ĝi defendis la interesojn de la biciklantoj kontraŭ tiuj de la ĉevaloj. En 1905 oni dissolvis ĝin kaj transigis la enhavon de la kaso al la samjare fondita DCF. La malnova asocio estis loka klubo, kaj la nova asocio devis esti tutlanda. La unua eksterkopenhaga iniciato de DCF okazis tamen nur post la unua mondmilito.

Jam en 1897 aperis en Danio la unua Esperanto-klubo en la urbeto Nykøbing Sjælland. Ĝi ne longe daŭris, sed en 1906 la dua dana esperanta klubo estis fondita en Kopenhago kun la nomo *Esperantistforeningen* (Societo de Esperantistoj). Kaj jen en 1908 estis fondita Konversacia Esperantista Klubo (KEK) en Kopenhago kaj samjare Dana Esperanto-Asocio (kiu tiutempe havis alian nomon ol nun). Dum la sekvaj jaroj oni fondis klubojn en aliaj urboj. La prezidanto kaj sekretario de *Esperantistforeningen* ŝajne ne estis tute kontentaj pri la evoluo, ĉar ili fariĝis idistoj. Pro la ekzisto de Ido, la Esperanto-asocioj ne plu estis *strikte* ideaj asocioj, ĉar de tiam oni ja devis ankaŭ defendi la konkretan formon de la lingvo, ne nur la abstraktan ideon de lingvo internacia.

II

Sed ni revenu al la biciklantoj. La ĉevaloj baldaŭ ne plu estis problemo, anstataŭe la interes-konflikto estis kun la aŭtoj. En 1916 jam estis tiom da bicikloj en la urbo, ke iu en la urba delegitaro proponis malpermesi bicikladon sur "Strøget", la ĉefa strato en la centro de Kopenhago. Feliĉe la propono estis malakceptita.

Nuntempe "Strøget", kiel vi scias, estas piedira zono. Tion tre ŝatas la butikistoj, ĉar tio stimulas la butikumadon. Sed kiam oni enkondukis la piediran zonon, la butikistoj ege protestis, ĉar ili imagis ke la bonaj aĉetantoj bezonas aŭton por alveni ĝis la butiko kaj forporti la aĉetaĵojn. Ili ne pensis pri tio ke la kopenhagaj stratoj estas tiel mallarĝaj, ke tiom da aŭtoj simple ŝtopas la vojon al la butikoj. Nuntempe oni rekonstruas la grandan straton Nørrebrogade tiel ke busoj kaj bicikloj, sed ne privataj aŭtoj povas traveturi. Kiam oni enkondukis tiun reĝimon eksperimente, la butikistoj ankaŭ ĉi-foje protestegis, sed baldaŭ ne plu.

Dum la tri jardekoj post la unua mondmilito la membronombro de DCF stagnis. La asocio bone laboris, sed tiel longe ke la ŝtato ne venus al la ideo imposti la biciklojn, oni ne vere bezonis ekspansion. Ĉe la Esperantistoj, male, ĉi tiu periodo estas treege ekspansia. Ne nur aperadas novaj lokaj kluboj, ankaŭ estas fondita laborista asocio, kreiĝas la internaciaj, multnivelaj kursoj de Friis ktp.

Alia diferenco dum la unua periodo de la bicikla kaj Esperantista asocioj estas ke la laboron de la bicikla asocio plenumis unuavice la vicprezidanto – la prezidanto estis nur grava nomo kiu donu prestiĝon al la bicikla afero. Dum la unuaj kvar jaroj la prezidanto de DCF estis kapitano Fritz Hansen, kaj dum la sekvaj 22 jaroj estis direktoro de la nacia banko Schrøder. La unua vicprezidanto estis instruisto Jens Gabriel Jensen, kiu estis tre iniciatema homo. Interalie li fondis “Gabriel Jensens Ferieudflugter” (Feriaj ekskursoj de Gabriel Jensen), kiuj ebligis al laboristaj infanoj veni en la kamparon dum la somero.

Dum la 20-aj jaroj estis alia aktiva vicprezidanto, nome polica asistanto Max Tvermoes. Li en 1932 fariĝis prezidanto. Tiam la klasaj diferencoj ne plu tiom gravis, kaj la asocio mem jam havis sufiĉe da prestiĝo en la lando. Kelkajn iom amuzis ke la ĉefaktivulo de la bicikla asocio estas policano. Iun tagon en 1927 la “poemo de la tago” de la gazeto Berlingske Tidende temis pri biciklanto kiu ricevis monpunon antaŭtagmeze de la policisto Max Tvermoes, kaj posttagmeze plendis al la kompatema vicprezidanto de la bicikla asocio – Max Tvermoes. Reale, tamen, tio neniam estis problemo.

En la lastaj jaroj de la prezidado de Tvermoes eksplodis la dua mondmilito. La arkivaĵoj de la bicikla asocio de ĉi tiu periodo estas tre magraj, do oni ne scias precize kiel la asocio rilatis al “la nacia afero”, kiel oni dirus tiutempe. Male pri la Esperantistoj: ili evidente timegis ke oni simple malpermesos Esperanton, tiel kiel okazis en Germanio kaj en multaj okupitaj landoj. Pluraj Esperantistoj, precipe inter la laboristoj, agadis en la rezistado. Dum la unuaj militaj jaroj, kiam la timo estis granda, la membraro de KEK multe malkreskis, sed post 1943, kiam estis klare ke Germanio malvenkos, multaj denove aliĝis al KEK, kaj Esperanto en Danio entute prospere travivis la militon.

III

Post la milito pludaŭris la prospero de Esperanto kaj la malprospero de la bicikla asocio. Nun la biciklantoj eĉ ne povis administri 5.000-kronan subvencion de la biciklovendista asekur-kompanio. Oni tiutempe enkondukis framnumerojn, kaj DCF tenis sliparon kun la framnumeroj de la bicikloj kaj informoj pri iliaj posedantoj. Tiun laboron subtenis la asekura kompanio, sed DCF poste tute ne povis klarigi kiel la mono estis uzita. Daŭris longe, ĝis la fido de la biciklovendistoj estis riparita.

En 1959 la membraro de DEA atingis sian ĝisnunan rekordon – homoj ankoraŭ ne tiel vaste kredis ke la Angla lingvo jam venkis Babelon. Male, en 1957 DCF havis malrekordajn 862 membrojn, malpli ol triono de la membraro komence de la milito. Unu el la problemoj estis la disvastiĝo de la mopedo – aŭ la “biciklo kun helpa motoro”, kiel ĝi jure nomiĝis dum multaj jaroj. En la bicikla asocio oni longe diskutis ĉu oni rigardu la moped-veturantojn kiel aliancantojn aŭ ne. La diskuto fariĝis disputo, kaj en 1958 la prezidanto kolere demisiis kaj lasis la postenon al la vicprezidanto Svend Marker.

Marker estis ĉefpolicisto, kaj malgraŭ sia nomo tre diskreta kaj senbrua persono. Sed li estis ĝuste tiu kiun la asocio bezonis tiumomente. Lia koro brulis, ne tiom por la bicikla afero, sed por la asocio. En siaj jarraportoj kaj ceteraj eldiroj li insistadis ke la asocio estu respektinda: estu ordo en la ekonomio kaj la protokoloj, tiel ke la asocio povu teni la kontakton inter la membroj kaj simple pluekzisti. Li ankaŭ enkondukis la distingon inter prezidento (dane *præsident*) kaj prezidanto (*formand*). La prezidento estis membro de la reĝa familio princo Viggo af Rosenberg.

Eble fariĝis pli facile al la biciklantoj, ĉar la interes-konflikto kun la aŭtoj iĝis ĉiam pli klara. En 1962 la prezidanto de *Rådet for Større Færdsels-sikkerhed* (Konsilantaro por Pli Granda Trafika Sekureco) skribis en sia jarraporto ke kredeble baldaŭ malaperos la du-radaj trafikiloj: bicikloj, mopedoj kaj motocikloj. Simple ne estos spaco por ili, kaj krome estos tro danĝere iri per ili tra la ĉiam pli densiĝanta trafiko. Tiam eĉ Marker devis repliki en iom akra tono. Dum la sama periodo Esperanto komencis stagni en Danio, precipe pro internaj kvereloj.

Precize kion celu la asocio DCF, pri tio Marker ŝajne havis neniun klaran ideon. Sed dum sia deksesjara prezidado li iom post iom sukcesis altigi la membronombron al pli ol kvin mil, kaj el ili Marker estraranigis la

entuziasmulojn kiuj necesis por revigligi la agadon. Fine de la sesdekoj unu el la novuloj kaŭzis iom da disputo kun la biciklofabrikoj. La danaj bicikloj simple estis tro malmalmodernaj kaj pezaj. Komence la fabrikoj indignis kaj nomis la kritikanton fanatikulo, sed de post la komenco de la sepdekaj jaroj la fabrikoj lanĉis novajn ĉiam pli malpezajn biciklojn kun ĉiam pli da rapidumoj – kaj koloroj. Antaŭe ĉiuj bicikloj estis nigraj.

IV

Evidente biciklado komencis refariĝi moderna afero. Sed tia ĝi fakte ĉiam estis! Kiam DCF antaŭ la unua mondmilito korespondis kun la aŭtoritatoj, ili ĉiam tajpis siajn leterojn – kaj ricevis respondojn mane skribitajn. Kaj la unuan komputilon oni ekhavis jam en 1979 – de Apple, kompreneble. En 1986 tio tamen montriĝis esti problema, ĉar la diskaparato paneis, kaj estis malfacile akiri anstataŭan. La nova diskaparato kostis 30.000 kronojn kaj ampleksis 20 megabajtojn. Tute novan komputilon oni ne volis aĉeti, ĉar kun la softvaro tio kostus almenaŭ 100.000 kronojn. Sed la prezoj ja falegis, kaj malmultajn jarojn poste oni akiris IBM-kongruan personan komputilon. Dum la 90-aj jaroj estis ekstra avantaĝo al la aktivuloj de la asocio, ĉar se oni havis problemojn kun sia komputilo – kaj kiu ne havis, precipe tiutempe – ĉiam estis iu komputila guro inter la aliaj aktivuloj.

Dum la lastaj 70aj kaj fruaj 80aj jaroj la ĝenerala etoso de DCF estis tre maldekstra, sed la asocio neniam fariĝis funde tendenca. Dum la antaŭa periodo oni ĉiam penis por havi dialogon kaj bonan tonon kun FDM kaj ĉiuj politikaj partioj, sed ankaŭ poste tiu tradicio restis. La plej bona ekzemplo de tio estas Arne Melchior, kiu estis trafikministro inter 1982 kaj 1986. Li estis membro de la “Centraj Demokratoj”, kiu estis la plej laŭte por-aŭta partio en la parlamento. Lin DCF invitis kiel ĉefan parolanton ĉe la “Tago de la biciklantoj”, granda kopenhaga bicikla manifestacio. Kaj fakte, se oni iom gratis la surfacon, montriĝis ke kvankam Melchior estis tre por-aŭta, li estis neniom kontraŭ-bicikla. Eble li tendencis pretervidi iujn konfliktojn inter la diversspecaj trafikantoj, sed li estis aŭskultema al ĉiuj, ankaŭ al la biciklantoj.

Kaj fakte ne laste al Melchior ni ŝuldas, ke estas tiel bona biciklo-kunporta reĝimo en la danaj trajnoj. Historie, la rilato inter la ŝtataj fervojoj (DSB) kaj la biciklantoj longe estis pli grata ol glata. Dekomence oni povis kunporti la biciklon kun la alia bagaĝo en aparta vagono. Sed en 1917 DCF gajnis proceson kontraŭ DSB pri difektiĝo de la biciklo de membro.

Kaj en la sama jaro DSB rifuzis kunporti biciklojn dum la feria tempo. La traktado de bagaĝo, kiun la pasaĝeroj ne kunportas mem, postulas multe da laborforto kaj tempo, do tiu aranĝo fariĝis ĉiam pli ĝena al DSB. Post la dua mondmilito ĉiuj salajroj ege plialtiĝis, kaj la vojaĝantoj ĝenerale kunportis ĉiam malpli da pakaĵoj, do iom post iom simple malaperis la bagaĝaj vagonoj de la trajnoj.

Sed kial DSB do ne simple lasis homojn mem ŝargi kaj malŝargi la biciklojn? La privataj fervojoj ja faris tion senprobleme. Fine DCF kaj la trafikministro konvinkis la fervojan administracion, kaj nuntempe ni povas konstati ke en Danio eblas kunporti biciklon en praktike ĉiuj trajnoj. Jen belega ekzemplo ke indas organiziĝi – se oni scias kion oni volas kun tio!

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel. 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. – Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenciĝohoroj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj. Rigardu ankaŭ la hejmpaĝon: www.esperanto-i-naestved.dk.

Okazos:

Kiel antaŭe anoncite, ni ek de la aŭtuna sezono 2011 kunvenos mardojn.

Provizora plano:

Ma 20.09 je h 14.00: Studgrupo.

Ma 04.10 je h 19.30: Danlingva prelego.

Ma 25.10 je h 14.00: Studgrupo.

Ma 08.11 je h 19.30: Danlingva prelego.

Ma 22.11 je h 14.00: Studgrupo.

Ma 13.12 je h 14.00: Jularanĝo.

Ni planas someran ekskurson al Odense sabaton la 20an de aŭgusto.

Aliĝo kaj informoj ĉe la sekretario.

Okazis: Somera paŭzo.

Paperaj gazeteltondaĵoj

- 28.03.2011 Nordjyske Stiftstidende: Intervjuo kun Ejnar Hjorth
04.2011 Jernbanefritid: Jernbanedag under årets Verdens-kongres
04.2011 Radio Vatikano: Esperanto en radio
10.05.2011 Ugebladet, Næstved: Asocia registro
13.05.2011 Berlingske, Kultur: remote Hus og hjem skribas interalie “en slags arkitektonisk esperanto”

Iomete magra rezulto!!

Ni daŭre insiste instigas vin sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

Vikingoj cerbumas

Ŝajnas ke la Esperanto-ondo kiu “inundis” Usonon dum 2010 ankoraŭ ne tute perdis sian efikon. La jena komikso aperis en la serio “Hägar the Terrible” (konata en danaj gazetoj kiel “Hagar den Skrækkelige”, t.e. Hagar la Terura) de la usonano Chris Browne:



(Komikso sendita de Bob Felby per Betty Chatterjee)

La barbulo estas Hägar, la maldikulo lia helpanto *Lucky Eddie* (en la dana versio konata kiel *Leif Lalleglad*). Notu kiel Hägar senesperigas kiam Leif uzas la esprimon “lingvo universala” anstataŭ “lingvo internacia” pri Esperanto. Tiel oni *neniam* diru!!! Temas pri unu el la plej stultaj eraroj en la ~~propagando~~ informado pri Esperanto!! Unu kiu vere devus esti antikviĝinta jam en la vikinga epoko!

La Granda Preĝotago

Vendredon la 20-an de majo danoj libertempas pro la dana festotago, la Granda Preĝotago, kiu ĉiam okazas la kvaran vendredon post Sankta Vendredo.

La elpensinto de la festotago estas Hans Bagger, kiu estis la episkopo de Roskilde dum la jaroj 1675 ĝis 1693. Dum la du unuaj jaroj de sia ofico li enkondukis tri fastajn festotagojn, kaj unu el ili, la Granda Preĝotago, estis leĝigitaj en la jaro 1686.

Oni ĵaŭde vespere antaŭavertis Grandan Preĝtagon sonigante la plej grandajn sonorilojn preĝejajn. Tio signifis, ke la civitanoj tuj ĉesigu la komercadon kaj aparte fermu la drinkejojn. Oni fastis ĝis la fino de la vespera diservo, kaj dum la venonta tago oni ne rajtis labori, vojaĝi, ludi, vetludi ktp. Tiuepoke ĝi estis nur unu el multaj preĝotagoj.

En 1770 Johann Friedrich Struensee (1737–1772), kiu estis la kuracisto de la mensmalsana reĝo Kristiano la 7-a, la reala reganto kaj cetere la amanto de la reĝino, decidis ke la danoj ne plu malŝparu tempon pro la amaso da preĝotagoj. Ĉar kredante je la protestanta etiko, kiu emfazas laboron kaj utilan agadon, li nuligis duonon de la tiamaj 22 feriaj tagoj.

Tamen la Granda Preĝotago postvivis la elpurigon; la nunaj danoj kompreneble estas dankaj pro tio. 325 jarojn post la inaŭguro de tiu ĉi festotago oni ne multe pensas pri ĝia origina celo, tamen ĝi estas vere dankultura okazo. Precipe kopenhaganoj kutimas vesperpromeni la tagon antaŭ la festotago, kaj reveninte hejmen ili manĝas specialajn bulkojn nomatajn “hveder” (tritikaĵoj). Oni ofte celebras konfirmaciojn je tiu tago. Tamen verdire por la plejparto da loĝantoj estas bonvena ŝanco por plezuri sin, malstreĉiĝi kaj butikumi. Jes, eĉ se malmultaj butikoj danaj funkcias, ĉiuokaze kopenhaganoj povas facile butikumi en Malmö aŭ Helsingborg.

Supozeble nek Hans Bagger, nek Johann Friedrich Struensee aprobus nian manieron festi la tagon. Tamen se politikisto proponus forigi ĝin, okazus revolucio dana.

Betty Chatterjee

La dana patrina tago

En Danio kiel en multaj aliaj landoj oni festas la patrinan tagon, kiu ĉi tie ĉiam okazas en la dua dimanĉo de majo. Okaze de la tago gefiloj regalias la patrinojn per dolĉaĵoj, floroj, parfumoj, memoraj ornamteleroj ktp. Kvankam la patrina tago, same kiel Halovino kaj Sankt-Valentena tago, havas radikojn ne en la dana kulturo sed en la usona, oni entuziasme bonvenigis ilin. Jen afero konvena al festemuloj, kaj eĉ pli konvena al komercistoj; ĉar en la butikoj abundas tentaj ofertoj de plej diversaj luksaĵoj.

Kvankam la materiisma aspekto de la okazaĵo estas nuntempe ege videbla, ĝia origina ideo estis tute alia, kaj ne ĉiuj forgesis ĝin. La inspiron por la dana patrina tago oni ŝuldas al la usonaninoj Julia Ward Howe (1819–1910) kaj Anna Jarvis kaj al la dano Christian Svenningsen (1896–1979).



Julia Ward Howe, kies edzo estis unitarano, oponento de sklaveco kaj socia reformisto Samuel Gridley Howe, ankaŭ unitaraniĝis, opiniante ke religie pli gravas agado ol kredo. La geedza paro ambaŭ radikale opiniis pri sklaveco kaj virinaj rajtoj. Tamen Samuel Gridley Howe preferis ke la edzino apogu lin kaj prizorgu la familion sen ia ajn agado eksterhejma. Unue Julia Ward Howe akceptis sian rolon, kaj escepte de vizitoj al la preĝejo ŝi restis hejme, kie ŝi prizorgis la familion kaj verkis poemojn kaj teatraĵojn. Tamen iom post iom ŝi indignis pro la kontrolemo de la edzo. La eksedziĝon ili konsideris, tamen tia solvo estis tro kruda por ŝi pro la certa perdo de la infanoj. Anstataŭ eksedziĝi ŝi komencis studi filozofion, lernis diversajn lingvojn, apogis la agadon de la edzo, kiu eldonis revuon kontraŭ sklaveco. Dum la Usona Enlanda Milito 1861–1865 Julia Ward Howe famiĝis pro sia poemo ‘batala himno de la respubliko’. Ŝi estis tre ŝokita pro la buĉado kaj la sociaj konsekvencoj de la enlanda milito. Tiel en la jaro 1870 ŝi ankaŭ verkis proklamaĵon proponante internacian tagon de patrinoj, por ke la tutmonda patrinaro postulu pacajn konflikto-solvojn.

Julia Ward Howe ne sukcesis enkonduki la patrinan tagon, sed ŝia ideo parte inspiris alian virinon, Anna Jarvis (1864–1948) kies patrino Ann Jarvis organizis virinajn laborklubojn en kvin usonaj urboj. En 1907, du jarojn post la morto de la patrino, Anna Jarvis lanĉis kampanjon favore al la fondo de patrina memortago. La unua patrina tago estis samjare celebrita en la preĝejo, kie la patrino de Anna Jarvis instruis lernantojn en la dimanĉa lernejo. La ideo rapide disvastiĝis en Usono kaj finfine la prezidento Woodrow Wilson deklaris la unuan tutlandan patrinan tagon en 1912.

La dano Christian Svaningsen elmigris al Usono en la jaro 1911, dum la unua mondmilito li rekrutiĝis en la usona armeo. Post la milito li revenis al Danio, kie li agadis favore al militvidvinoj kaj patrinoj, kies filoj estis batale mortigitaj. (Danio mem ne partoprenis la unuan mondmiliton, sed la nuna suda Jutlando apartenis al Germanio, kaj la tieaj junuloj devis servi en la germana armeo). Christian Svaningsen proponis, ke ĉiujare okazu patrina tago por tiaj virinoj, kies ĉefa celo estu la mongajno por la bonfara fondaĵo ‘Moderhjælpen’ (la patrina helpo). La propono estis akceptita, kaj la unua tago de patrinoj okazis la 12-an de majo 1929. Oni festis la tagon per grandega florekspozicio en Kopenhago, kie oni vendis 34 000 poŝtkartojn kun informoj pri la patrina tago. Dum la sekvaj jaroj Christian Svaningsen ruze utiligis la kreskantan intereson komercan pri la tago per postuloj, ke ĉiu kiu volas komerce profiti la okazon, ankaŭ aĉetu afiŝojn kaj donacu iom de la profito al ‘Moderhjælpen’.

Depost la jaro 1969 la dana porcelena firmao Bing & Grøndahl ĉiujare faras novan ornamteleron honore al la patrina tago. Tiuj ĉi estas ŝatataj kolektaĵoj. La desegno de 2011 estas kuŝanta tigrino kun tigridoj.

Estas ĝojinde, ke multaj danaj patrinoj ĝuis donacaĵojn de la gefiloj okaze de la tago de la patrino. Pli malĝoje estas, ke aliaj ne plu havas kontakton kun siaj gefiloj. Interalie la tutmondiĝo dispelas familianojn al la tuta mondo, kaj postuloj laboraj kaj sociaj signifas, ke oni ne havas la tempon ĝojigi la patrinon maljunan, eĉ unu fojon jare okaze de la patrina tago.

Betty Chatterjee

Signolingvo de surduloj

... sed tio ja ne estas vera lingvo!

La menciita ekkrio estas kutima reago ne nur al nia kara lingvo Esperanto, sed ankaŭ al la signolingvo(j) de la surduloj.


Post vizito de hejmpaĝoj pri signolingvo ŝajnis al mi ke kelkajn el la antaŭjuĝoj tiurilate oni povas kompari kun tiuj kiuj ni spertas rilate al Esperanto. Tial mi kontaktis samideaninon Mette Hjerting, kiu funkcias kiel instruisto por surduloj dum 24 jaroj. Kune ni preparis prelegon pri signolingvoj en nia kopenhaga klubo.

Kaj ni uzis la kutimajn malkomprenojn kiel elirpunkto:

ANTAŬJUĜO # 1: Surduloj en ĉiuj landoj povas interkomuniki pere de signolingvo.

ANTAŬJUĜO # 2: Signolingvo estas farita de aŭdantoj por helpi al la surduloj.

Ambaŭ estas falsaj. Signolingvoj estas tiel nomataj “naturaj” lingvoj, kiujn surduloj evoluigas en diversaj partoj de la mondo. Ekzistas kelkaj centoj (aŭ miloj) da signolingvoj tra la mondo. Surdaj angloj, usonanoj kaj aŭstralianoj ne povas interkomuniki ĉar ili uzas tri diversajn signolingvojn. Ankaŭ la dana kaj sveda signolingvoj estas tute malsamaj.



*Kelkaj vortoj el la dana signolingvo: alfabeto, fabelo, komputilo, libro
(el la repaĝo de la dana surdula eklezio)*

ANTAŬJUĜO # 3: Signolingvo estas primitiva. Oni ne povas esprimi abstraktajn aferojn (same kiel en Esperanto, ne-surda ne-esperantisto volus aldoni).

Signolingvo estas tre riĉa esprim-maniero. Ĝi estas same riĉa kiel parolata lingvo (kelkaj diras eĉ pli riĉa). Pruvi tiun faktan al eksteruloj estas malfacile. Tamen en Usono oni faris eksperimentojn traduki “tekstojn” tien kaj reen (angla – signolingvo – angla) kaj ĉiuj detaloj estis konservataj (en Esperanto oni iam faris similajn eksperimentojn kun similaj rezultoj).

Male al Esperanto, ne estas facile lerni signolingvon. Mette uzis dek jarojn por lerni ĝin.

Dum la preparado de nia prelego mi vidis kelkajn filmetojn de signolingvoj en la interreto, kaj mi daŭre miris pri la rapideco de uzado de signoj. Nekredeble ke eblas observi tiom da detaloj tiel rapide.

DENASKAJ PAROLANTOJ

Ankaŭ en signolingvoj estas denaskaj parolantoj, tipe infanoj de surdaj gepatroj.

En kelkaj landoj la signolingvo de la surda popolo havas certan leĝan statuson, sed ne en Danio. La politikistoj ne akceptas la danan signolingvon kiel minoritatan lingvon (ĝi ne estas vera lingvo kaj ĝi ne estas precipe dana, ili asertas) eĉ post surstrataj demonstracioj kun la slogano: ANERKEND MIG, ANERKEND MIT SPROG (agnosku min, agnosku mian lingvon).

Ankaŭ en Britio oni deziras ke la brita signolingvo havu la saman statuson kiel la kimra kaj la kornvala lingvoj.

La detalo kiu provokis la plej fortan reagon dum nia prelego estis la jena citaĵo de usonanino: “I’m happy I’m deaf, I would not want to be hearing” (Mi feliĉas esti surda, mi ne ŝatus esti aŭdanto). Laŭ Mette tiu estas tre ofta kaj sincera percepto. En multaj landoj la uzantoj de signolingvoj havas ege bonan socian konataron.

ANTAŬJUĜO #4: Signolingvo estas bazita sur la parola lingvo.

Ĝenerale signolingvoj evoluas izole de la ĉirkaŭa societo. La ĉeesto de signolingvoj montras, ke la homa kapablo ne nur lerni kaj uzi sed precipe krei lingvon estas mirindaĵo.

En la 70-aj jaroj oni provis krei internacian signolingvon kun la nomo Gestuno pli-malpli surbaze de la koncepto de Esperanto, sed ĝi ne prosperis.

Personoj kun alia handikapo, blindeco, estas oftaĵo en Esperantujo. Ekzistas pluraj kluboj por blinduloj. Sed ŝajne neniu surda persono iam lernis nian lingvon. Tre ironia tio estas, ĉar surduloj kaj esperantistoj havas tre gravan komunan situacion: riĉan esprimovan kulturplenan lingvon, kiun la eksteruloj mistaksas kaj malestimas.

P.S. Pro tio ke multaj surdaj infanoj nuntempe ricevas kohlean enplantaĵon (cochlear implant), la nombro de personoj, kiuj bone scias signolingvon baldaŭ draste malkreskos.

Bent Jensenius

Mi volus danki vin

‘Mi volus danki vin’ komenciĝas kanto pri nia majstro. Memevidente mi volus danki lin, tamen mi ankaŭ volus danki al Eckhard Bick, Jens S. Larsen kaj aliaj, el kies granda laboro rezultis la pasintjara eldono de Dansk Esperanto-Ordbog.

Kiel denaska parolanto de la angla mi unue dubis, ĉu mi multe uzos la vortaron, ĉar mi ankaŭ posedas la bonan kaj plej novan vortaron anglan de John Wells. Tamen fakte mi pli ofte konsultas la vortaron de Jens k.a., ĉar tiu estas pli detala kaj interalie inkludas la ege gravan informon pri transitiveco aŭ ne-transitiveco.

Se vi ne jam aĉetis la vortaron, konsideru aldoni la titolon al la listo de iam aĉetotaj libroj.

Dansk Esperanto Ordbog

Dr.phil.Eckhard Bick

Jens S. Larsen

Eldonita de Esperantoforeningen for Danmark / Dana Esperanto-Asocio

ISBN 978-87-87508-01-8.

Betty Chatterjee

Tutpollanda Esperanto-Kongreso

En la urbo Nova Sonĉo (Nowy Sącz), sude de Krakovo okazis Esperanta kongreso fine de aprilo kaj komence de majo ĉi-jare. Aliĝis 170 esperantistoj, sed alvenis 140 kune kun gastoj el Germanio, Hungario kaj Slovakio. La ĉefa temo estis "Frateco Kaj Amikeco Inter Ĉiuj Homoj".

Riĉa programo ampleksis prelegojn, ekskursojn, spektadon de dancaj kaj kantaj ensembloj. Estis invititaj eminentuloj de la urbodomo, vojevodio, gazetaro kaj televido. La prezidantino de Pola Esperanto Asocio Halina Komar tre bone uzis la okazon por vaste reklami la renkontiĝon. Ĉeestis tri famaj hungarinoj, Ilona Koutny, Zsófia Kóródy kaj Katalin Kovács. Tre riĉa estis la Libroservo prezentita de Stano Marček de Slovakio.

Ni vizitis kelkajn lokojn famajn pro iliaj historiaj vidpunktoj, kiel ekzemple la urbo Malnova Sonĉo, kiu estis fondita en la 10-a jarcento. Tre interesa estis prelego de Zsófia Kóródy el Herzberg. Ŝi montris evoluon de la lingvo Esperanto en Germanio, Ĉeĥio, Pollando kaj Hungario. Ŝi instruas en Herzberg, kaj kunlaboras inter aliaj urboj per vizitado, invitoj de alilandanoj al Herzberg kaj reciproke. Per komputila prezentado ŝi montris, ke dum Internacia Tago de Lingvoj ŝi interkonsentis kun 4 landaj asocioj, ke ili samtempe flugigu po 1000 diverskolorajn balonojn kun la kvarlingva surskribo: "Kontraŭ Rasismo". Ŝi ankaŭ montris, ke tiamaniere ŝi sukcesis ricevi monon por Esperanta laboro en la menciitaj landoj.

Dua utila evento okazis dum sunriĉa tago sur la urboplaco de Nova Sonĉo. Tie kolektiĝis amaso da loĝantoj, esperantistoj kaj militista orkestro, kies muzikistoj estis vestitaj per belaj uniformoj. En la placo, kiu estis bele ornamita per naciaj kaj Esperantaj flagoj, la orkestro solene ludis la Eŭropan himnon, kaj oni kantis la Esperantan tekston.

Per laŭtparolodilo estis anoncite, ke ek de la 1-a januaro oni uzos en Eŭropa Unio nur la Esperantan tekston (sed tio eble estis malfrua aprila ŝerco).

Multaj lernantoj el la loka lernejo kunludis per perkutaj muzikiloj montrante simpatian al Esperanto.

Eugeniusz Rybarczyk

Himalaja renkontiĝo

La 9a Internacia Himalaja Renkontiĝo 26.2. – 8.3.2011



Hazarde en Esperanta kunveno ĉe mia bona amiko Svend Friis, mi vidis broŝuron pri Esperanta renkontiĝo en Nepalo, pri kiu mi jam antaŭe aŭdis kaj havis grandan emon partopreni. Ŝajnis interesa evento, kaj mi tuj aliĝis. Mi neniam antaŭe partoprenis en kongresoj aŭ grandaj renkontiĝoj, kaj ĉar mi ankoraŭ ne tre bone regas la lingvon, mi estis tre scivola pri la vojaĝo.

Ridetantaj personoj kun verda flago atendis nin en la flughaveno kaj alportis nin al la hotelo. Tie estis multe pli da esperantistoj, alvenintaj pli frue el Svedio, Francio, Mongolio kaj Japanio, kaj kompreneble multaj nepalanoj. La etoso estis vigla, ni salutis unu la alian, kaj la gastigantoj kreis varman etoson. Ĉeestis entute 65 personoj, duone nepalanoj kaj duone eksterlandanoj.

La unuajn tri tagojn ni restis en Katmanduo, kie ni vizitis templojn kaj aliajn sanktajn lokojn.. Religie Nepalo estas dividita en budhismo kaj hinduismo. Tiuj du sanktaj religioj kunvivas paceme inter si, kio montras ion pri la toleremo kaj afableco de la civitanoj. La hinduoj estas ankoraŭ dividitaj en kasta sistemo, kiu malrapide malaperas kaj perdas signifon.

La budhanoj sekvas tradicie malfermecon kaj toleremon, tute laŭvorte. La urbo donas fortan impreson, ĉio estas alia ol en nia kulturo. Oni vidas amason da homoj kie ajn, el kiuj multaj estas tre malriĉaj, kaj ekestas speciala trankvileco meze de io kio al eksterlandanoj ŝajnas iom kaosa atmosfero. Post kelkaj tagoj oni trovas la novan ritmon kaj sekvas ĝin.

La kvaran tagon ni komencis kvartagan promenadon en la montaro. La unua tago estis tre streĉa, kun multaj abruptaj supreniroj, kaj vespere ni estis tre lacaj. Ni tranoktis en hotelo/junulargastejo situanta ĉe la vojo kie ni promenis. Ni pasigis kelkajn belajn tagojn en la naturo kaj spertis kiel vivas la kamparanoj en belaj vilaĝoj kultivante la teron aranĝitan en terasoj.

Post tiu promonado ni faris ekskurson al la suda parto de Nepalo. Tie ni vizitis la naskiĝdomon de Budho kaj la lokon kie li kreskis. Precipe la naskiĝdomo havas grandan signifon al budhano, kaj tie estis multaj vizitantoj. Proksime troviĝas multaj temploj donacitaj de budhanoj el la tuta mondo.

Dum la lastaj tagoj ni estis denove en Katmanduo, kie ni aĉetadis, kaj dum la lasta vespero estis renkontiĝo de multaj partoprenantoj. Oni aŭskultadis paroladojn kaj pluraj ĉeestantoj amuzis nin. Parto de la j partoprenantoj planis sian foriron post kelkaj tagoj. Unu el la nepalanoj aranĝis por ili tritagan vojaĝon al apuda urbo. Multaj el ni aliĝis. Ni forvojaĝis al Pokhara, kien iras multaj homoj kiuj alvenas por monta migrado en Nepalo. Estis urbo tre bele situanta ĉe lago – kaj multe pli trankvila ol Katmanduo. Tie ni spertis belegan sunleviĝon ĉe kelkaj el la plej altaj montoj kaj spertis belegajn migradojn.

En la aviadilo vojaĝante hejmen mi rememorigis al mi la vojaĝon. Estis treege bela travivaĵo. Precipe la etoso kaj kunigo pro la fakto ke estis esperantistoj kiuj renkontiĝis, imponis min. Mi havis kelkajn malfermitajn invitojn de homoj el pluraj eŭropaj landoj, kiujn mi volis renkonti, kaj la energio kaj amaso da tempo kiun mi uzis por lerni la lingvon revenis al mi pere de varmaj travivaĵoj. Mi sentis grandan inspiron por daŭrigi mian klopodadon lernante tiun interesan lingvon.

Peter Wraae

Invito



Esperanto-semajno en Martinus Center, Klint, 4500 Nykøbing Sj.

Post la 96-a UK en Kopenhago inter 30-a julio kaj 6-a de aŭgusto 2011 la Esperanto-semajno en Martinus Center, Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Matene estos interpretata prelego, poste kune kun Ole Therkelsen estos studrondoj, kaj posttagmeze estos konversaciaj rondoj. Ne estos prelegoj rekte en Esperanto, nur interpretitaj en la granda prelegejo. En la vespero estos distra programo kaj teo kaj kukoj en la restoracio Terrassen.

Informojn pri aliĝo ktp. bonvolu vidi ĉe www.martinus.dk. Bonvenon!

Ole Therkelsen



SCENO EL LA JARKUNVENO...



Unu parolas ...

... aliaj notas ...



... aŭskultas ...

... kaj pripensas.

